

**GPS** estas konkreta sistemo por determini punktojn en spaco.

Proponata termino: pozici-trova sistemo  
 Vortigo ĉe unua mencio en teksto: pozici-trova sistemo *GPS*  
 poste eventuale pli konciza: *GPS*-sistemo, aŭ nur *GPS*

**ISDN** estas konkreta cifereca reto por integritaj servoj.

Proponata termino: cifereca servo-reto  
 Vortigoj en teksto: cifereca servo-reto *ISDN* / *ISDN*-reto / *ISDN*

**ATM** kaj **STM** estas konkretaj teknikoj por transsendi informojn, ĉe *ATM* en nesinkrona, ĉe *STM* en sinkrona maniero.

Proponataj terminoj: nesinkrona / sinkrona transsend-tekniko  
 vortigoj en teksto: nesinkrona transsend-tekniko *ATM* / *ATM*-tekniko / *ATM*  
 sinkrona transsend-tekniko *STM* / *STM*-tekniko / *STM*

**PDH** kaj **SDH** estas konkretaj plektaj teknikoj por datenaj konektoj, ĉe *PDH* en preskaŭ sinkrona, ĉe *SDH* en (tute) sinkrona maniero kaj por alta kapacito.

Proponataj terminoj: preskaŭ-sinkrona / sinkrona datenkonekta tekniko  
 Ĉi tie hazarde eblas Esperanto-tradukoj de la nomoj kun samaj majuskloj, se oni anstataŭigas la vorton „tekniko” per „hierarkio”. Tamen, „hierarkio” objektivne ne estas tiom taŭga kiel „tekniko”.  
 Vortigoj en teksto: preskaŭ-sinkrona datenkonekta tekniko *PDH* / *PDH*-tekniko / *PDH*  
 sinkrona datenkonekta tekniko *SDH* / *SDH*-tekniko / *SDH*  
 aŭ: Preskaŭ-sinkrona Datenkonekta Hierarkio (*PDH*) / *PDH*  
 Sinkrona Datenkonekta Hierarkio (*SDH*) / *SDH*

**IF** estas procedo por laŭvica transsendo de informoj per Interreto.

Proponata termino: Interreta protokolo  
 (laŭ PIV: **protokolo 2** Komplika kaj konvencia procedo por komunikado inter komputiloj)  
 Ĉi tie hazarde ia produktano samas al la termino.

Vortigoj en teksto: Interreta protokolo (prefere sen la mallongigo)  
 aŭ: Interreta Protokolo

**VoIP** estas (ĉiu) telefonado per Interreto. La angla *VoIP* estas ne produktano, sed mallongigo de termino.

Proponata termino: Interreta telefonio  
 Vortigoj en teksto: Interreta telefonio (prefere sen la mallongigo)

D-ro *Zlatko Hinš* ankaŭ rekomendas legi siajn artikolojn pri ekonomia terminologio en la revuo „La Merkato”, numeroj 86, 87 kaj 89. Lia nova artikolo „Liverkondiĉoj kaj damaĝoj de varoj” en la numero 92 estas ĝis nun nur rete atingebla:

[www.ikef.info](http://www.ikef.info)

Proksime al jarfino mi dankas pro ĉiu kontribuo. Travivu agrablajn festotagojn. Restu ankaŭ en 2007 fidela al nia kara faklingvo. Niaj plej karaj deziroj estu paco ĉie en la mondo, sanon al vi kaj al viaj karaj.

Via *Heinz Hoffmann*



# Terminara Kuriero

TeKu 129

Decembro 2006

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uidal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingor

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 **Nova retadreso: Hoffmann-IFEF@t-online.de**

## Esperanto-difinoj torentas en datumbankon

Karaj geamikoj,  
 rezulte el bonega kunlaboro inter *UIC*-kolegino *Rosalinde Taucher* kaj mi, senprobleme sukcesas enigi difinojn kaj terminojn en la *UIC*-datumbankon *RailLexic* laŭ niaj decidoj. Dum pasintaj monatoj tiu laboro estis prioritata ĉe mi. Prefere mi elektis nociojn, por kiuj ni decidis terminŝanĝon. Ĝis nun estas enigitaj 398 difinoj kaj 229 terminŝanĝoj. Ekster tio mi kompilis kaj sendis listojn pri problemoj rezultantaj el diferencoj inter difino kaj nacilingvaj terminoj. Post la kreo kaj dissendo de ĉi tiu numero de TeKu, mi daŭrigos la enigon de plurcent tradukitaj difinoj, por ke nia aktuala laborrezulto aperu en la eldonota *CD-ROM*-disketo *RailLexic 4.0*.


Por iom faciligi serĉadon en terminaro, mi intencas oportunkaze renversigi la vortordon de plurelementaj terminoj. Jen du ekzemploj:

### 08235 elvetursignalilo

Eblo por montri kune ĉiujn signalilo-terminojn, estas anstataŭigo de plurelementa substantivo per duvorta termino (substantivo, adjektivo). Terminmodifo de „elvetursignalilo” al „signalilo elvetura” eblas sen ŝanĝigo de senco.

### 00604 antaŭsignalilo

Tiukaze terminmodifo al „signalilo antaŭa” iom ŝanĝus la sencan, do ne oportunas. *RailLexic*-sistemo ebligas ankaŭ alian solvon - per aldono de terminvariantoj. Al tio servas sesa cifero de la ŝlosilnumero. Por laŭalfabete listigi kaj la originan terminon kaj renversan varianton, oportunas enigi: 006040 antaŭsignalilo  
 006041 signalilo [antaŭ-]  
 Tiukaze aperus ekzemple en terminarlibro Esperanto – Ĉeĥa laŭalfabete:



elvetura signalilo

antaŭsignalilo PR65/604 *předvěst /f/*  
**signalilo [antaŭ-]** PR65/604 *předvěst /f/*  
 En renversa terminarlibro, ekzemple Dana – Esperanto, aperus sole la origina Esperanto-varianto:  
**fremskudt signal /n/** PR65/604 antaŭsignalilo  
**signal [fremskudt -]** /n/ PR65/604 antaŭsignalilo  
 Tamen, por ne tro ampleksigi la enigojn, ni limigu tian solvon al vere bazaj fervojaj terminoj.

## Pri la taskoj el TeKu 128

Ĝis nun nur du kontribuoj alvenis, nome de inĝ. *Zdeněk Polák* kaj de d-ro *Zlatko Hinšt*. Koncerne la nociojn 02910 kaj 09817 (paĝo 3) ambaŭ kolegoj preferas la duan solvon „...ŝpura”. Sekve mi enigis en la datumbankon:

**02910 veturvojo pare ŝpura**

**09817 veturvojo unuŝpura**

Pri uzo de la terminoj „trajno”, „trako” kaj „vagono” ankaŭ ĉe magnetvojo (paĝoj 3/4) ĝis hodiaŭ neniuj opiniesprimoj alvenis.

Koncerne la ĝeneralan problemon „signalo / signalilo”, *Zdeněk Polák* esprimis sian saman opinion kiel mi. Al la konkretaj demandoj pri la nocioj 08169-0 kaj 08169-1 (paĝoj 5/6) mi vane atendis kontribuon.

## Rezultas jenaj novaj taskoj

### a) pri cirkulado sur dutrakaj fervojlinioj

La nocioj **08169-0** kaj **08169-1** (TeKu 128, paĝoj 5/6), pri kiuj ni denove diskutu, rilatas al kontraŭsenca trakuzo. Tiukoncerne ni ankaŭ traktu samteman nocion:

**00701** Cirkuladsistemo sur dutraka fervojlinio, senrestrikte permesanta ambaŭdirektajn veturojn per plena signalteknika sekurigo, kaj sur laŭsenca kaj sur kontraŭsenca trakoj, cele favorigi trafikan fluecon.

ĉeĥa	<i>obousměrný provoz</i>	itala	<i>banalizzazione (binari)</i>
dana	<i>vekselspordrift</i>	pola	<i>dwukierunkowość ruchu</i>
franca	<i>banalisation (des voies)</i>	rumana	<i>circulație în sistem banalizat</i>
germana	<i>Gleiswechselbetrieb</i>	serba	<i>obostrani saobraćaj</i>
hungara	<i>menetirányváltás</i>		<i>(banalizacija koloseka)</i>

La ĝisnuna Esperanto-termino „trakutiligo ambaŭsenca” koncernas ankaŭ unusolan trakon, do ne inkludas dutrakecon. Jen du ŝanĝproponoj por elekti aŭ nove pripensi:

**1) dutrake ambaŭsenca cirkulado**

**2) ambaŭsenca dutrakeco**

### b) pri magnetvojoj terminoj

El la demando, ĉu uzi la vortojn „trajno”, „trako” kaj „vagono” ankaŭ ĉe magnetvojo (TeKu 128, paĝoj 3/4), rezultas taskoj por *RailLexic*-nocioj sole koncerne trakon. Jen la baza nocio:

*Wugiu Dianche* = trolebuso (09437), *Dianpingche* = bateribuso. La termino *Dianchedao* esprimas **relvojn por trajoj**.

Ĉe aliaj traktitaj nocioj ne ekzistas problemoj:

- **metro** (01585) = *Dixia tielu*, mallongige *Ditie*
- **magnetvojo** (11672) = *Cixuanfu tielu*, mallongige *Cifu tielu*
- **vagono** = *Cheliang*
- **vagongrupo** (02153) = *Chezu*
- **trajno** (09018) = *Lieche*
- **trajnkompleto** (sen trafika karakterizaĵo) = *Huoche*
- **manovrado** (05374) = sinonime *Diaochē* kaj *Diaodu*
- **ranĝi** = *Bianzu*

## Kiel trakti anglajn nomojn en informadiko?

En prelegoj kaj artikoloj pri moderna fervojtekniko pli kaj pli aperas informadikaj terminoj, kaj sekve necesas mencii nomojn de konkretaj kreaĵoj (produktoj). Pro internacia uzo de la kreaĵoj kadre de tutmondiĝo, oni mondvaste nomas la produktojn preskaŭ nur per anglaj mallongigoj, kiuj en la koncerna fakularo estas pli konataj ol eventualaj tradukoj. Kolego *Zlatko Hinšt* atentigas pri la neceso trakti tiun problemon en nia sekcio. Li elektis jenajn ok anglajn nomojn:

*GPS* = *Global Positioning System*

*ISDN* = *Integrated Service Digital Network*

*ATM* = *Asynchronous Transfer Mode*

*STM* = *Synchronous Transport Module*

*PDH* = *Plesiochronous Digital Hierarchy*

*SDH* = *Synchronous Digital Hierarchy*

*IP* = *Internet Protocol*

*VoIP* = *Voice over Internet Protocol*

Por terminologie trakti la problemon, komence necesas distingi inter

- **unue**: nocio / difino / termino

- **due**: konkreta kreaĵo (produkto) / produkt-priskribo / produkt-nomo

Laŭ ekspliko de d-ro *Reinhard Föbmeier*, esperantisto-specialisto pri informadiko, la unuaj ses nomoj estas propraj nomoj ne tradukendaj. Sekve ankaŭ en Esperanto-tekstoj aperu iliaj mallongigoj senŝanĝe. Oni laŭtlege ilin unuoplitere, ekzemple „*go-po-so*”. Kompreneble ĉiu tia konkreta produkto apartenas al difinebla nocio kun termino. Por fakaj Esperanto-tekstoj ni preferu, unuamencie enigi kaj la Esperanto-terminon kaj la anglan mallongigon (la lastan kursive). Ĉe sekvaj mencioj pleje sufiĉas la nura mallongigo. La tekstmotivo decidus, ĉu necesas aldoni la tutan anglan produkt-nomon aŭ / kaj la produkt-priskribon, kiu estas pli detala ol difino.

Via opinio-esprimado pri la temo estas bonvena. En TeKu 130 sekvos kelkaj ekzemploj senpere pri fervojtekniko.

Jen la unuopaj informadiko-produktoj:

<b>11406</b> Horizontala parto de magnet-veturvojo, apogita je unuopaj punktoj.			
ĉeĥa	<i>nosník jízdní dráhy</i> ( <i>magnetická dráha</i> )	itala	<i>trave di supporto alla via di guida</i>
dana	<i>brodrager</i>	pola	<i>konstrukcja nośna toru jezdnego</i>
franca	<i>tablier (voie magnétique)</i>	rumana	<i>tablier</i>
germana	<i>Fahrwegträger</i>		
hungara	<i>pályatartó gerenda (mágneses lebegtetésű vágány)</i>		

Antaŭ jardeko ni decidis la Esperanto-terminon „veturvoja trabo (magnetvojo)”. Por pripensi ŝanĝon al „**trako (magnetvojo)**” rigardu la desegnitajn du transversajn sekcojn: Magnet-veturvojo konsistas el fundamentoj, pilieroj kaj horizontala konstruciaĵo. Ĉu la lasta nomiĝu „trako”?

Ĉefaj elementoj de tia „trako” estas traboj, maldekstre el betono, dekstre el ŝtalo. Al la traboj estas fiksitaj ŝvebig- kaj gvidinstalaĵoj.

La nocioj **11218 / 11960** koncernas beton-an / ŝtalan portkonstruaĵojn (trabojn) de magnet-veturvojo. Sekve de „trako”-decido mi proponus ŝanĝi la ĝisnunajn terminojn „veturvojo betona / ŝtala” al „**traktrabo betona / ŝtala (magnetvojo)**”.

Sekve la nocio **11850** koncernanta magnetvojan trabon antaŭfabrikitan je optimumaj longoj, decidkaze ricevu la terminon „**traktrabo normigita (magnetvojo)**” anstataŭ kiel ĝis nun „veturvoja trabo normigita (magnetvojo)”.

La ekzistantaj magnetvojaj funkcias laŭ ĉirkaŭprena principo montrata en la sekva transversa sekco. Tion priskribas jena nocio:

**11408** Eco de magnetvoja veturilo, ĉirkaŭpreni per siaj mekanikaj partoj la veturilportantajn elementojn de veturvojo tiel, ke de-vojiĝo aŭ renversiĝo ne eblas.


ĉeĥa	<i>obkročující jízdní dráhu</i>
dana	<i>sikret mod afsporing</i>
franca	<i>enveloppant la voie</i>
germana	<i>fahrwegumgreifend</i>
hungara	<i>menetirány-tartó</i>
itala	<i>avvolgente la via di guida</i>
pola	<i>obejmujący tor</i>
rumana	<i>incâlecare a căii de ghidare</i>

Jen du ŝanĝproponoj de la ĝisnuna termino „trabĉirkaŭprena” por elekti aŭ nove pripensi:


**1) trakĉirkaŭprena (magnetvojo)**

**2) ekstere kapta (magnetvojo)**

La propono 1) rilatas al „trako”-decido, la propono 2) al la termino „**kapto interna (magnetvojo)**” de alia konceptita sed ne realigita principo laŭ jena nocio:



du specoj de magnet-veturvojoj



ekstere kapta principo

**11556** Konstruociprincipo ĉe veturilo de magnetvojo, enhavanta internan kapton de duoptraba veturvojo fare de ŝvebig- kaj gvidinstalaĵoj.

Dum la principo 11408 necesigas la supre sur paĝo 3 desegnaĵe montratan sistemon (11334), por la principo 11556 oni devus konstruigi alian sistemon (12184). Jen ambaŭ nocioj:

**11334** Por la magnetvojo *TRANSRAPID* decidita veturvoja sistemo kies ĉefa portkonstruaĵo konsistas el betona aŭ ŝtala skatoltrabo vetursekurece ĉirkaŭprenata de la veturilo.

**12184** Magnet-veturvojo kies ĉefa portkonstruaĵo konsistas el du sur unu aŭ du pilieroj paralele aranĝitaj betonaj aŭ ŝtalaj traboj, inter kiuj la veturilo estas portata kaj gvidata laŭ interna kapto.

Ĉe „trako“-decido ankaŭ ĉi tie estas preferinde ŝanĝi la ĝisnunajn terminojn „veturvojo unuoptraba / duoptraba (magnetvojo)“ al „**trako unutraba / duoptraba (magnetvojo)**“.

Diversaj konceptoj de veturvoj-forkoj por magnetvojo troviĝas en jenaj nocioj:

<b>11248</b> .....	<b>fleksebla</b>	<b>11573</b> .....	<b>baskula</b>
<b>11321</b> .....	<b>turnebla</b>	<b>11888</b> .....	<b>transverse komutebla</b>
<b>11325</b> .....	<b>fleksebla trivoja</b>	<b>12132</b> .....	<b>veturilregata</b>


Sekve de „trako“-decido, la ĝisnunajn terminojn „trabforko ....." (magnetvojo)“ ni ŝanĝu al „**trakforko .....** (magnetvojo)“.

Karaj geamikoj, bonvole ne konfuziĝu! Per la detaloj sub b) mi volas ne tro ŝarĝi vin, sed nur klarige fintrakti trovitajn terminproblemojn pri magnet-veturvojoj. La taskoj por vi ĉefe koncernas nur la nociojn 08169-0, 08169-1, 00701, 11406 kaj 11408. La terminoj de cetero menciitaj nocioj dependas de nia decido pri 11406.

### Pri bazaj ĉinaj terminoj

Sur paĝo 6 en TeKu 127 mi menciis estontan diskutadon kun ĉinaj kolegoj pri bazaj transportfakaj terminoj, por ebligi komparon inter ĉina faka pens-esprim-maniero kaj enhavo de PIV / *RailLexic*. Prepare por la 58-a IFEF-kongreso, ĈFEA-prezidanto *Li Sen* verkis kontribuon pri ĉina terminologio. Intertempe okazis koncerna korespondado inter li kaj mi, el kio klariĝas jeno:

- Por **fervojo** (07574) ĉinoj preskaŭ sinonime uzas la vortojn *Tielu* kaj *Tiedao*, sed klarfakte la termino *Tiedao* esprimas **relvojon de fervojo**.
- Ĉinoj havas la terminon *Dianche*, kiu esprimas kaj elektro-tramon kaj elektro-aŭtobuson. Esperanto-traduko povas esti **elektra urbtrafika veturilo**. La unuopaj specoj nomiĝas: *Yougui Dianche* = **tramo** (09212),



**nova fervojlinio al Tibeto**